

Esperanto-Brno

Esperanto-Brno - Kluba prelego 21.1.2012

Signifo de akvo en nia vivo

Marie Klimentová

Akvo estas baza kondiĉo de vivo. En akvo la vivo komenciĝis. Ĝi estas solvantaĵo, en kiu okazas ĉiuj procedoj en organismo. Homa korpo enhavas 70%, vegetaĵoj 90% da akvo. Akvo transportas en homa korpo vivtenaĵojn, kiujn kun akceptita nutraĵo atingas ĝustan lokon, t. sig. en celuloj, cerbo kaj muskoloj. Sen akvo ni ne povus moviĝi, nek spiri, ĉar akvo certigas ĉion, kio okazas interne de ni. Por senbalastigi nian korpon de venenigaj substancoj de metabolo, ni devas akcepti ĉiutage 2,5 litrojn da akvo.

Manko 20% de korpa akvo estas mortiga. Je senakviĝo mortas homo proksimume post 7 tagoj. Saturecaj trinkaĵoj en estas taŭgaj, ĉar ili ekscitas stomakon, kaŭzas meteorismon kaj povas malbonigi spiradon kaj funkciadon de koro.

Dum plialtigita laborpecaĵo aŭ plialtigita temperaturo de ĉirkaŭaĵo necesas trinki duoble.

- Akvo estas la plej grava krudaĵo en ĉiuj industriaj fakoj, oni uzas ĝin al fridigado, al plivarmigado, al tralavado, en nutraĵfako, al elfarado de elektroenergio ktp.

- Ĝi estas baza kondiĉo de vegetaĵa kaj anima fabrikado.

- Akvo estas ankaŭ fonto de vivsubteno en apudmaraj ŝtatoj

- Akvo fluoj kaj akvoareoj estas gravaj en trafiko

- Akvoareoj influas ankaŭ klimato de regiono

- Ĝi estas utiligata dum rekreacio kaj sporto

Mineralaj akvoj hvas ankaŭ terapian efekton. Valoro de akvo estas ne nur ekonomia sed ankaŭ ekologia.

Al 1,5 de homaro mankas aliro al sendifekta akvo.

2,6 miliardoj de homoj sentas mankon de higiena interna lando.

En 20-a jarcento malaperis 50% de malsekejoj.

3 milionoj da homoj mortas jare je malsanoj eksigitaj de infektita akvo kaj malbona higieno - 90% el ili estas infanoj ĝis 5 jaroj.

Pro tiu fakto, ke akvoprovizo je Tero malaltiĝas, estas tre malagraba. Laŭ taksado de Organizado por nutrado kaj agrokulturo malaltiĝis akvoprovizon en Eŭropo je 1/3, en Azio je 3/4, kaj en Afriko je 2/3.

Diferenco inter akvoprovizo kaj ĝia konsumo daŭre pliprofondiĝas kaj eblas supozi, ke akvokonsumo daŭre plialtiĝos.

Trinkakvo fariĝas strategia krudaĵo.

- Akvo estas plej longe malpurigita teritorio de vivmedio
- Dum 1 jaro malpurigas akvon 60 mil tunoj de kruda watto
- La plej grandaj fontoj de malpurigado de maroj kaj oceanoj estas enmariĝoj de riveroj kaj grandaj urboj
- Ĝi estas fonto de epidemioj, transportitaj pere de akvo

Signifon de akvo resumas

Eŭropa akva ĉarto el la jaro 1968

Jen estas ĝi:

1. Sen akvo ne ekzistas vivo. Akvo estas por homo neanstataŭigebla krudaĵo
2. Provizoj de bona akvo ne estas neelĉerpeblaj, Nepe necesas reteni ilin kaj disponi ili ekonomie kaj ŝpareme
3. Malpurigado de akvo malutilas al homoj kaj ĉiuj organizacioj
4. Kvalito de akvo devas esti adekvata al postuloj de homa sano kaj al celoj de aplikado
5. Uzata akvo devas esti redonita al ricevanto en tia stato, kiu malfavore ne influos ĝian pluan eluzon.
6. Por konservado de akvoprovizo rimarkindan signifon havas flaŭro, ĉefe arbaro.
7. Akvoprovizojn necesas konservi en nuntempaj statoj
8. Kompetenta organizacio devas estri akvomastrumadon
9. Protekto de akvo bezonas disvastigon de scienca esplorado, instruado de fakuloj kaj edukado de publiko
10. Ĉiu homo devas ŝpareme kaj ekonomie uzadi akvon por bono de ĉiuj
11. Akvoekonomia planado devas esti direktita ne laŭ politikaj kaj administraciaj limoj, sed laŭ naturaj limoj de riverbaseno
12. Akvo ne konas limojn, kiel komuna fonto bezonas internacian kunlaboron.

Ĉar vi scias, ke sen akvo ne estas vivo, ni vivu laŭ tiuj principoj.